


# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 108**

***N-RO 11 (79), NOVEMBRO 2019***

## Enhavo

### *Originala poezio*

Tatjana Vŝivceva. La antaŭvintra melankolio 3

Klara Ilutoviĉ. “Junulo venis por la medkontrolo” 3

Olda Koboldo. La devoj en la skalo de l’ eterno 4

### *Originala prozo*

Tatjana Auderskaja. Miniaturoj 5

### *Tradukita poezio*

Bulat Okuĝava. Finiĝo de la laboro. *Trad. K. Ilutoviĉ* 7

### *Tradukita prozo*


Vladimir Arsenjev. La falsa besto. *Trad. G. Ŝlepĉenko* 8

### *Historio*

Elena Poljanskaja kaj Sergej Palmov **Historio**  
de Esperanto en Samara ekde 1912 ĝis 1997 12

### *Originalaj kantoj*

Gennadij Ŝilo. Amika rondo, Dia rozo, La venko,  
Magia sento – amo 25



## Originala poezio

### La antaŭvintra melankolio


*Tatjana Vŝivceva*



Kviete velkas la aŭtuno:  
Folioj putras en ĝardenoj,  
Dum kurtaj tagoj pala suno  
Varmigi la naturon penas,

Per mola neĝo vintro flate  
La frostiĝantan teron tentas,  
L'aŭtunan mondon senkompatate  
Trablovas refreŝiga vento,

Kristale puras la aero,  
Piketas vangojn frostoj feble,  
Kaj dume ŝajnas nekredible,  
Ke iam venos primavero...



*Klara Ilutoviĉ*

\*\*\*

Junulo venis por la medkontrolado.  
Kuracistino estis tre maljuna/  
Radiis la junulo per vivobolo  
En sia aĝo fluganime suna.

Pri l' plendoj lin demandis l' oldulino,  
Kaj li respondis, ke li tute sanas  
Kaj, laŭ konvinkoj de la medicino  
Plu vivi li cent kvindek jarojn planas.

– Vi estas optimisto! Bonespere,  
Do, vivu, kaj vivamu, kaj vivemu!  
Se povas vi trankvili tiom vere,  
Mi la unua vian manon premu!

La sprita vorto, vigliganta l' sanon,  
En granda lum' de la humurinklinoj,  
Se ŝi esperas premi tiun manon,  
Estu pli multe da tiaulinoj!

# La devoj en la skalo de l' eterno

*Olda Koboldo*



Mateno freŝa. Vel' en blua mar'  
Ĉu ŝajnas, ĉu reale fore svagas.  
Kaj friska vento haŭton malvarmigas  
Agrable iom pli ol malagrable.  
Somera fino aŭ aŭtunkomenco  
efikas kiel ĝoj' iome trista,  
La fino estas ja neevitebla,  
Sed dume ne sentebblas en real'.

Nenifarado. Sed multegaj devoj,  
Nun prokrastataj, sed nenien fuĝaj  
La konsciencon tiklas per ekzisto.  
Ne maltrankvilu ili la etoson,  
Kaj dissolviĝu en la onda bruo  
La zorgoj pri urĝeco de l' aferoj.

Ja kion gravan ili ĉiuj havas  
Sur fono de la rokoj kaj la maro,  
Kun miliojara ekzistado?  
La konkaj el jurasa periodo  
Videblas en krutaĵo ĉe la plaĝo.  
Moluskoj, kiuj enloĝigis ilin  
Verŝajne same havis urĝajn zorgojn,  
Sed nun nur krakas sub piedoj niaj  
Aŭ lokon trovos en raraj kolektoj,  
Kaj tia sorto estas plej feliĉa...

Ĉu post da jaroj ja cent kvindek milionoj  
Eĉ unu nur osteto konserviĝos  
El mia organismo? Mi jam ne parolas  
Pri la ideoj, planoj ambiciaj  
Kaj la cetera vivo de l' spirito?

Fortiĝas vent'. Ne plu videblas velo.  
Ĉu jam ne venis temp' forlasi l' plaĝon?  
Ĉu ne atendas la damnita komputilo  
Kun komencita antaŭlonge artikolo?  
Eĉ se ne estos nepre ĝi legota  
Post miliono, eĉ post mil da jaroj,  
Ja povos esti, du-tri homoj legos  
Ĝin post monato, kaj ne tuj forgesos.  
Do, ek al la labor' ne bezonata  
En skalo de l' epok' geologia,  
Sed konsciencon pova trankviligi!



### Miniaturoj

*Tatjana Auderskaja*

#### Kial jaguaro havas felon kun makuloj

Iam jaguaro estis tute flava, kiel leono. Sed lia karaktero estis la sama, kiel nun: la plej feroça besto en ĝangalo.

Ĉio viva timis jaguaron. Sed foje sur lian felon eksidis papilio. Ĉarma bruna papilio kun grandaj duonrondaj flugiloj. Ŝi movis ilin, kiel du malgrandajn ventumilojn, kaj la jaguaro tuj eksentis teneran blovon. Al li fariĝis tiel agrable, kvazaŭ iu karesas lian dorson. Neniu antaŭe karesis lin; oni nur timis kaj malamis.

Li volis, ke la papilio ne forflugu, ke ŝi ĉiam restu kun li kaj tenere tuŝu lian haŭton. Kaj ankaŭ al papilio ekplaĉis sidi sur la dorso de jaguaro: tiam ĉiuj rimarkis ŝin, tian etan kaj brunan antaŭe, kaj subite oni komprenis, ke ŝi estas rave bela, kaj ŝiaj flugiloj nuancas de oro.

Do, la jaguaro kaj la papilio decidis ne disiĝi plu; kaj baldaŭ la tuta felo de jaguaro kovrĝis per bela aro de papilioj, idaro de tiu unua.

Tial la jaguaro nun havas felon kun brunaj makuloj.



#### La bela rozo

Oni donacis al mi superban rozon. Ĝi estis diafana kaj trembrilis kaj glimis per miloj da lumoj: ruĝaj, verdaj, violaj. Ravita pro ĝia beleco, mi tenere ĉirkaŭpolmis ĝin kaj kaŝis ĉe la sino, proksime al la koro.

Sed baldaŭ mi ekhavis tre strangan impreson, kvazaŭ io frida tuŝas mian bruston, kaj poste eksentis, ke malvarmaj fluoj kuras laŭ la korpo. Kun miro mi gapis – kaj trovis nur grandan malsekan makulon, kiu tiel malagrable incitis la haŭton.

La rozo estis el glacio.



#### Libero

Mi estis libera kaj plenpova, mi ŝvebis super nuboj, ludante kun vento. Neniu egalas min, mi estas la sola reganto de Subĉielo. Sed ho! Aperis de la sudo rivalo, kiu ankaŭ deziras regi la aeron kaj ĉiam rikanas min. Sed ĉi-foje li ne evitos punon. Atako, ankoraŭ atako! Li falas teren, disŝirita de miaj ungegoj.

La venko! Mi jubilas, flosante en aeraj ondoj sub suna brilo.

Sed jen subite io tiras min teren. De la pinto de ĝojo mi estas krude ĵetita al tero. Oni prenas min, faldas kaj portas al la domo, kie denove metas en malluman keston.

Mi estas kajto.



## Ama kvadrato

Jam antaŭlonge venis tempo por krei altnivelan spektaklon pri nia Esperanta vivo.  
Kaj fin-fine ni kreis ĝin!  
La ensemblo "Verda deliro" el la klubo "Verdaĵo" prezentas sian ĉefverkon...

### PERSONOJ KAJ PLENUMANTOJ

1. Esperanton' Bonov – la ĉefa pozitiva heroo. Juna komputisto kun poŝkomputilo. Tre bone rete instruas Esperanton.
2. Aĉjo Malbonov – la eterna komencanto. Iam li estis esperdona.
3. Ina Amova – simpla esperantistino en top-bluzo. Ŝi havas tre belan kaj kompleksan staturon... mi pardonpetas, komplikan naturon.
4. Profesoro de Esperanto – tre sperta esperantisto.

### UNUA PARTO

*(Bonov kaj Ina kliniĝas super poŝkomputilo)*

Bonov: Ina, ĉu vi kredas, ke ni kreos novan Mikrosoft aŭ Linuks ?

Ina: Ne. Ni elpensos novan serĉsistemon kaj nomos ĝin RET-INO!

Bonov: Ina, ĉu vi sentas la kreaĵon entuziasmon?

Ina: Aha...

Bonov: Ĉu vi scias, Ina, iam mi pensis, ke vi estas simpla stultulino...

Ina: Ĉu tio ĉi malhelpas al tiuj, kiuj amas ... Esperanton?

*(Bonov kaj Ina ĥore):* Tuj ni ion eltrovos!

Malbonov: Neniam! Tuj mi faros malhonorindan agon!

Ina: Ne, vi ne faros tion. Ja en la profundo de via animo brilas la flamo de espero!

Estas bezonate nur kompreni vin!

Malbonov: Vere! Mi ĉesu lernadon de Esperanto. Anstataŭ tio mi vizitos suspektindajn lokojn; mi drinkos tie, uzos drogaĉojn kaj malsaniĝos je aidoso. Tiam ĉiuj ekamos kaj kompatos min.

Bonov: Kaj mi en la sama tempo okupiĝos pri Esperanto, sentante por tio naturan bezonon!

### DUA PARTO

Profesoro: Mia profesio estas profesoro. Aŭ esperantisto. Aŭ ano de UEA, aŭ ao de UNEA, - mi jam ne memoras. En infaneco mi ŝatis Esperanton. Aŭ infanojn... Aŭ ne ŝatis... Kaj nun mi estas maljuna kaj emas spertinterŝanĝi kun junaj esperantistoj. Mi ŝatas paroli pri Esperanto. Kaj ĝenerale mi ŝatas paroli... Ho, Esperanto! Vi estas plena de enigmoj! Skizofrenio! Skorzonero! Skovelo! Skolopo! Kiaj vortoj!

Ha, Bonov! Denove vi alvenis kun viaj frenezaj ideoj?

Bonov: Mi estas certa, ke vi, profesoro, komprenos min.

Profesoro: Ĉu kompreni? Ja vi denove neniigas la teorion de instruado. Mi ne permesos al vi pereigi la fundamentan verkon de tuta mia vivo!

Bonov: Profesoro, dank' al vi ni fariĝos la oferoj de scienco.

Profesoro: Iĝu! Kaj mi ripozos sur miaj laŭroj kaj kripligos la animojn de junaj esperantistoj. Mi estas obskuranto!

Bonov: Ina, ni perdu la esperon kaj foriru de ĉi tie. Edziniĝu al mi!

Ina: Ne, Esperanton'. Mi edziniĝos al Malbonov. Ja mi estas tiel komplika naturo, kaj li tia komencanto... Mi devas helpi lin.

Bonov: Sed vi suferos!

Ina: Jes. En la flamo de sufero mia amo hardiĝos kaj fariĝos eĉ pli pura!

Malbonov: Sed mi perfidos vin.

Ina: Iru! Forlasu min por alia esperantistino!

Malbonov: Ne tuj. Poste. Kiam vi havos bebon. Aŭ eĉ du...

Bonov: Mi devas vangofrapi vin.

Malbonov: Vi ne povas tion fari, ĉar vi havas tre altajn moralajn kvalitojn.

Bonov: Ĉiuokaze por vi ne estas loko en Esperanto!

Ptofesoru: Ho, Esperanto. Vi, junaj, ne komprenas ĝin. Vi verkas en Esperanto iujn neseriozajn kantaĉojn kaj teatraĵetojn anstataŭ aŭskulti miajn seriozajn tralegojn kaj prelegojn. Vi noktumas apud lignofajroj kaj provludas tage, anstataŭ partopreni en someraj universitatoj.

Vi ne obeas min, kvankam mi estas profunda pensiulo... pensiulo... tamen tre distriĝema. Jen, denove mi perdis mian aŭtoritaton... Kie ĝin trovi?

Ina: Ho, kiel li suferas! Mi tuj edziniĝos al li! Mi estos profunde malfeliĉa edzino de spertulo. Aŭ de pensiulo... Aŭ de penisulo...

Malbonov: Ina, edziniĝu prefere al mi. Pro la lasta kondiĉo.

Ina: Mi ne povas. Ĉar mi estas tiel komplika laŭ mia naturo.

(*kantas*)

Bonov: Ina, mi estas feliĉa! Mi amas vin!


(*kantas*)

Malbonov: Ho, kiel mi morale pereis!

(*pereas*)

KURTENO

## Tradukita poezio



*Bulat Okuĝava*

### Окончание работы

Последняя крепость разрушена.

Шапки долой!

Дописана повесть. Поставлена точка.

Свобода!

К тому же гитара устала дремать под полой,

и дама прекрасная мерзнет у самого входа.

Антоновкой прелой, лежалой  
пропахли углы,

с рассеянной грустью перо золотое  
сжимаю

и бури мне больше не снятся,  
желанья круглы...

Но это не значит, что я вам того же  
желаю.

1984

### Finiĝo de la laboro

La lasta fortres' detruita. Honor' al la  
fin'!

Novel' finverkita. Mi metis la punkton.  
Libero!

Kaj, krome, subbaske laciĝis dormeti l'  
gitar',

Kaj ĉe l' enirej' frostas la beluin' en l'  
espero.

L' anguloj plenplenas je l' poma  
kuŝputra odor'.

En svaga malĝoj' oran plumon tenante,  
mi spiras,

Kaj mi ne plu sonĝas tempestojn en  
pac' de l' humor',

Sed ne opiniu, ke mi al vi l' samon  
deziras.

*Esperantigis Klara Ilutoviĉ*

## Tradukita prozo

### La falsa besto



### Vladimir Arsenjev

*Arsenjev Vladimir Klavdievič (1872 – 1930), rusia esploristo de la Fora Oriento, geografisto, etnografisto kaj verkisto, ano de la Rusa Geografia societo, honora ano de la Vaŝingtona nacia kaj Brita geografia societo.*

*Li naskiĝis en familio de fervoja servisto. En 1895 li sukcese finis kursojn de la Peterburga infanteria junkra linceo, kaj komencis militservi en regimento apud urbo Lomĵa (nun Pollando). En 1900 oni sendis lin militservi en urbon Vladivostoko. En 1902 – 1903 li organizis kelkajn ekspediciojn por esplori la Sudan Primorjeon kiel estro de ĉevalĉasista taĉmento. En 1904-1905 partoprenis en rusoj-japana milito kiel estro de garnizona esplortaĉmento. Pro militaj meritoj oni dekoraciis lin per tri ordenoj. En 1906-1910 li esploris montojn de Sihote-Alin. En 1910 laŭ ordono de caro Nikolao la Dua jam kiel subkolonelo, Vladimir Arsenjev estis liberigita de militservo, konservante militistan rangon, kaj estis sendita por servi en ĉefan departamenton de sistemo de teruzado.*

*En 1910-1918 Arsenjev estis direktoro de regionesplora muzeo en Habarovsk, kaj samtempe li estis instruisto de For-Orienta universitato, kaj kiel profesoro instruis en Vladivostoka pedagogia instituto en 1921.*

*Vladimir Arsenjev kreis novan, regionesploran direkton en la rusiajenc-beletro.*

*Liaj ĉefaj libroj "Tra Ussura regiono" (1921), "Dersu Uzala" (1923), "En montaro de Sihote Alin" (aparta eldonajo en 1937), kaj aliaj estis multfoje reeldonitaj, kaj estas plenaj de amo al naturo de Fora Oriento, kaj prezentas poezian kaj samtempe sciancan bildon de vivo en tajgo, rakontas pri ĝiaj kuraĝaj homoj. En 1930 Vladimir Arsenjev laŭ oficiala versio mortis pro "akuta pneŭmonito".*

*Honore al Arsenjev estis nomita urbo, troviĝanta je 160 km de Vladivostoko.*

*Dufoje en Sovetunio estis faritaj filmoj laŭ motivoj de verkoj de V. Arsenjev: "Dersu Uzala" far reĝisoro Agasi Babajan (1961), la filmo ricevis premion "Ora lupo" de la Bukareŝta kinofestivalo, kaj "Dersu Uzala" far la fama japana reĝisoro Akira Kurosava (1975), la filmo ricevis plurajn prestiĝajn premiojn, i.a. la usonan premion "Oscar" en 1976 kiel la plej bona eksterlanda filmo.*

*Ĉi tie estas prezentata rakonto "La falsa besto" el libro "En tajgo" de Vladimir Arsenjev.*

Ekde junaĝo mi interesiĝis pri Ussura regiono, multe legis pri ĝi. Kiam mia revo realiĝis, kaj mi veturis al la For-Oriento, min posedis kortremo pro ĝojo.



Inter miaj kunvojaĝantoj estis homoj, kiuj jam vizitis marbordojn de la Granda oceano. Mi demandis ilin pri tajgo, pri ĝiaj kvarpiedaj vivantoj. Sed mi pli interesigis pri tigro. Ĝi ŝajnis al mi neordinara viva estaĵo.

En Vladivostoko mi konatiĝis kun ĉiuj famaj ĉasistoj, kaj kun granda intereso aŭskultis iliajn rakontojn pri la stria besto.

Mi bone memoras momenton, kiam mi unuafoje trafis en tajgon, kaj kun ĝojo pensis pri tio, ke, finfine, mi troviĝas en vera ĝangalo, kie libere vagadas tigro – kaj, povas esti, tre apude de mi. Subite sciuro, kiu kaŝiĝis en densaj arbustoj, kun snufado eksaltis sur arbon. Mi tiel ektimis, ke preskaŭ ekpafis flanken, de kie aŭdiĝis bruo.

Iom post iom mi komencis alkutimiĝi al tajgaj sonoj, kaj distingi tiujn. Muĝado de ruĝa cervo, bleko de sovaĝa kapreolo, kaj akresona krieto de diversaj ronguloj, iĝis konataj por mi. Mi facile distingis ankaŭ birdajn kriojn.

La tigro tute posedis mian imagon. Mi eĉ vidis ĝin en sonĝo: forkuris de tiu, surgrimpis arbon, kaj travivis nekredablajn aventurojn. Ĉasistoj diris, ke tiu besto estas neordinara: oni renkontas ĝin tiam, kiam malpli atendas tiun. Mi enviis al ĉasistoj, kiuj havis ŝancon renkontiĝi kun la besto en arbaro.

Mi decidis vagadi en tajgo ĝis mia revo efektiviĝos. Dum la tuta tago mi troviĝis en arbaro, penetris en netraireblajn densejojn, kaj esploris bestajn piedsignojn surtere. Mi imagis tigron, kuŝantan en densaĵo de sovaĝa vinberujo. Jen ĝi ekleviĝis, sin skuis kaj larĝe oscedis, aliris al toplo, leviĝis sur postaj piedoj, retrofleksis la dorson, kaj tiris sin simile al kato, per ungoj gratante ŝelon de la arbo. Poste ĝi laŭvice ekrigardis ambaŭflanken, kaj ekiris por ĉasado.

Poste, kiam mi havis ŝancon multfoje vidi tigron, liberan en sovaĝa naturo, ĝia aspekto jam ne naskis tian impreson, kian mi sentis unuafoje vidante ĝin, kaj pri kio mi volas nun rakonti.

Foje, tio okazis en 1900, mi vagadis en tajgo.

Regis aŭtuno, kaj matenaj frostoj jam per malhelviola, purpura kaj oranĝkolora tonoj koloris arbofoliojn kaj herbon. Aperis unuaj signoj de folifalo – sub la piedoj susuris falinta foliaro, aŭtuna vento trapenetris arbaron. Nokte iomete pluvis, kaj velka, brunflava herbo ankoraŭ ne sukcesis sekiĝi. Sunradioj penetris en densejon de arbo, kaj ŝanĝbrilis en akvogutoj, transformante tiujn en brilantajn diamantojn.

Mia konstanta kuniranto dum vagado en tajgo estis siberia pafisto Polikarp Olenĵev, tre bonanima homo kaj sperta ĉasisto. Sed tiutage li restis en bivako por ripari ŝuojn, kaj mi sola kun plumberpafilo foriris en tajgon serĉi bonaziojn.

Mi iris laŭ vojeto, kaj rigardis de unu flanko al la alia. Mi rememoris rakontojn de ĉasistoj, ke tigro emas moviĝi laŭ padeto.

Subite mi rigardis malsupren, kaj ekvidis ĉe miaj piedoj mem sur la padeto freŝan piedsignon de tigro. La tre danĝera rabobesto iris antaŭ mi! La leganto povas imagi, kio okazis al mi! Miaj sentoj miksiĝis: mi alterne sentis jen timon antaŭ danĝero, jen ĉasistan instinkton kaj scivolemon... Mi rememoris, ke mi havas plumberpafilon, kaj en sako troviĝas nur unu kuglohava kartoĉo. Sed reveni jam estis malproksime kaj malfrue. Mi haltis min, pripensis situacion, reŝargis fusilon, kaj ekiris antaŭen. La padeto alkondukis min al monta rivereto. Kiam mi atingis ĉebordan sablaĵon de la rivereto, mi tuj ekvidis grandajn piedsignojn de tigro. Tiuj ankoraŭ ne sekigiĝis kaj estis tute malsekaj.

Mi ne paŝis, sed ŝteliris, ofte haltante sin, atente aŭskultis kaj rigardis ĉirkaŭen. Post la rivereto denove komenciĝis tajgo, kaj post ĝi – malnova forbrulinta zono. Mi ankoraŭ ne atingis arbarrandon, kiel ekvidis tiun, kiun timis renkonti. Grandega tigro kuŝis surventre, fleksante sub si postajn krurojn. Lia kapo ripozis sur antaŭaj piedoj, etenditaj antaŭen. Ĝi iomete eksvingis per la vosto, ŝajne levetis la kapon, kaj ekrigardis al mia flanko. Mi tuj kaŝis min post granda cedro.

Kion fari? Ĉu pafi? Sed tian beston oni malsukcesas mortigi per unu pafo, sed vundita, ĝi pli danĝeras. Ĉu pafi aeren? Sed tio logos ĝian atenton al mi. Ĉu mallaŭte reveni? Sed kiel fari tion?.. Mia koro estis preta elsalti el mia brusto, sur la frunto aperis grandaj gutoj de ŝvito, la gamboj tuj rigidigiĝis, kaj brakoj tremis.

Mi ekrigardis el post la arbo, kaj rimarkis, ke la tigro kuŝas samloke. Ĝia longa flava karno estis kovrita de vertikalaj nigraj strioj. Subite sub mia piedo krakis malseka branĉeto – la danĝera besto denove ekrigardis al mia direkto. Mia koro por unu momento haltis. Mi jam opiniis min pereita...

Subite mi ekvidis homon, irantan tra maldensejo. Kiel averti lin pri danĝero: ĉu pafi, kriu, kuri renkonte? Mi ne sciis kion fari, konfuziĝis, kaj samtempe eksentis, ke la homo kun fusilo enmane estas mia savanto. Li paŝis kaj rimarkis nenion, sed la tigro samloke daŭris kuŝi sur la ventro. "Tamen kia aŭdaca besto!" – mi ekpensis.

Samtempe la homo atingis la tigron, transiris ĝin, kaj iris plu.

Ankoraŭ ne komprenante kio okazis, mi nevole eliris el post mia embusko. Tuj ĉio klariĝis por mi.

Anstataŭ la tigro sur la maldensejo kuŝis granda malhelkolora lignobloko. Ĝi eĉ ne havis iajn elstaraĵojn, kiuj aspektus kiel la vosto aŭ kapo. Krome, el mezo de la dorso mem elstaris granda nodohava branĉo.

La homo rimarkis min, vikle demetis de sur la ŝultro la fusilon. Mi tuj vokis lin, kaj demonstrante pacajn intencojn, almetis mian fusilon al arbo.

Mia savanto estis vilaĝano Pirkov. Mi sincere rakontis al li pri tio, kiel timigis min la lignobloko.

– Kia? – li demandis.

– Jen tia, – mi respondis kaj montris la maldensejon.

– Tamen ĝi tute ne aspektas kiel besto, – Pirkov diris kaj strabe rigardis min: ĉu mi estas freneza? – Cetere, fojfoje okazas la situacio, – li diris. – Mi mem iufoje pafis arbostumpon, kvazaŭ tiu estis urso... Ni iru al vilaĝo por tranokti. Ŝajne nokte pluvos.

Ni ekiris laŭ padeto, kaj kiam transiris la rivereton, mi montris la tigrajn piedsignojn.

– Ĉu vi rekonis la lignoblokon kiel tigron, kaj ektimis?..– Pirkov demandis. – Estas bone, ke ne inverse.

– Kion signifas – inverse? – mi ne komprenis.

– Se vi rekonis la tigron kiel la lignoblokon, kaj sentime alirus al ĝi, tiam ni nun ne irus kune. Tiuj incidentoj ankaŭ okazas. La besto estas ruza. Se tigro rimarkos, ke oni postiras ĝin, komence ĝi forkuras, poste iras ronde, kaŝas sin embuske apud siaj piedsignoj, kaj atendas momenton por ataki ĉasiston deflanke aŭ deposte. Se vi estas sola, iri laŭ tigras piedsignoj mi ne konsilas.

Baldaŭ ni atingis la bivakon, kie Olentjev jam varmigis teon, kaj atendis mian revenon. Ni iomete ripozis, fumis apud eta lignofajro, kaj poste iris plu.

Kiam ni proksimiĝis al la vilaĝo, la suno jam kaŝiĝis sub horizonto. Foraj montopintoj iĝis rozkoloraj en radioj de sunsubiro. Odoro de malsekeco fariĝis pli akra. Super kelkaj kabanaj aperis maldikaj blanketaj radioj de fumo. De oriento proksimiĝis mallaŭta aŭtuna nokto.

## *Elrusigis Gennadij Ŝlepĉenko*



## *Historio*

# **Historio de Esperanto en Samara ekde 1912 ĝis 1997**

## *Elena Poljanskaja kaj Sergej Palmov*

- Jaro 1912. La unua konata mencio pri Esperanta rondeto en Samara estis en la revuo «La Ondo de Esperanto», №11, 1912. A. Kolĉin skribis pri organizado de E-rondeto en konstruaĵo de la ĉefa poŝta oficejo. Laŭ rememoroj de Pjotr Jefimoviĉ Astafjev, fama Samara esperantisto, la plej unuaj esperantistoj estis A. Kolĉin kaj A. Ohitoviĉ, fervojaj oficistoj. Astafjev rakontis ke li mem eksciis pri la lingvo de artikolo, eldonita en populara revuo «Heroldo de la Scio» (Вестник знания).
- Jaro 1914. Ŝajne, en Marto de 1914 P. Astafjev ricevis de konata pola familio la senpagan libreton, eldonitan en Varsovio kaj nomitan «Doktoro Esperanto. Internacia Lingvo. Plena lernolibro por Rusoj». Li abonis la revuon «La Ondo de Esperanto» (Moskvo) kaj ricevis la unuajn librojn en la internacia lingvo, nome «Patroj kaj filoj» de Turĝenev en traduko de fama Esperanta stilisto K. Bein (Kabe) kaj «Princo Serebrjaniĵ» de A.K. Tolstoj en traduko de Ŝidlovskaja. Poste P. Astafjev mem multe tradukadis al Esperanto. Li multon kontribuis por esperanta movado ne nur en Samara, sed ĉie, kie li loĝis kaj militservis.



### **Eternan memoron kaj nian respekton al Pjotr Jefimoviĉ Astafjev!**

- Jaro 1918. En la revuo «Libera Torento» №1, Aprilo 1918, samaraj esperantistoj proponis por vendado E-kovertojn, gratulkartojn, propagandfoliojn. Samjare en Samara estis kreita «Buroo de Esperantistaj Socialistoj» (el artikolo de E. Drezen «Internacia Laborista Kunligo» en la revuo «Internacia Lingvo», №1(29) Oktobro 1925).

Ni ankaŭ scias ke en 1918 en Samara, okupita de Blankaj Ĉeĥoj, oni eĉ surscenigis spektaklon en Esperanto (artikolo de Aleksej Semjonov en la revuo «Listok Samarskoj gubernii» №29 (36), 2 de Augusto 1997).

- Jaro 1925. Esperanto-movado en Samara reviviĝas. Ree ekfunkciis E-rondo ĉe Fervoja klubo je la nomo de Maslennikov (nun Teatro de Juna Spektanto). Ĉe la rondo okazis trimonataj E-kursoj por 35 personoj. Studentoj pagis 1 rublon monate. La mono estis pagita al la instruisto. La rondo ankaŭ organizes lecionojn pri E-historio, kreis ĥoran kaj dramajn studiojn, festis Zamenhofan tagon. Ankaŭ la rondo eldonis Esperanto-rusan murgazeton. La ĉefo de la rondo estis P. Astafjev. La rondo estis enskribita en Samara adresa libro en 1925.
- Jaro 1928. Fama Samara esperantisto Valerij Ŝadrin rememoris, ke en 1928 en Samara ekzistis du E-kluboj: klubo de vend-oficistoj kaj klubo de fervojistoj. Li eksciis pri la lingvo de sia patro, kiu mem ne estis esperantisto, sed havis Unuan Libron (verdan libreton) de Zamenhof. Juna V. Ŝadrin, tiam lernanto de la 8-a klaso, aliĝis al la klubo de fervojistoj. Prezidanto de la klubo estis juna kamarado Ŝeľznjakov. La klubanoj lernadis la lingvon, eldonadis murgazeton, ĥore kantis E-kantojn, ĉefe revoluciajn («La Internacio» k.s.). Membroj de la klubo korespondis kun esperantistoj de multaj landoj. Ili havis la sloganon: «Esperanto estas lingvo de proletoj de la tuta mondo!» La klubanoj estis membroj de Samara Esperantista Unio (SEU) kaj havis verdan membrokarton. En la karton oni gluis kotizmarkojn. SEU-organizaĵo estis vigla, vasta kaj estimata. Oni eldonis multajn esperantaĵojn (librojn, gazetojn, ktp.). SEU-membroj havis specialan insignon – verda stelo kun ruga ornamo. Insignojn kun blanka kampo oni ne rajtis porti, ĉar ili estis burgaj (neproletaj). Sekva slogano estis: «Ĉiu laboristo kaj komparano posedu la lingvon Esperanto!»



(Nova jaro 1987)

**Eternan memoron kaj nian respekton al Valerij Sergeevič Ŝadrin!**

- Jaroj 1928 -1933. Samaraj esperantistoj akceptis gastojn el eksterlando. Ekzemple, esperantisto-fervojistoj el Leipcig vojaĝis tra Soveta Unio per biciklo laŭ relojoj de ŝtataj fervojoj. Li vizitis ankaŭ samarajn esperantistojn. La renkontiĝo estis interesa, plena da solidareco. La unuan fojon oni aŭdis esperantan parolon kun nekutima prononco. La biciklo havis tri radojn – du grandajn kaj unu malgrandan. Sur la biciklo estis skribita: «Per Esperanto tra la Mondo». Ni ne scias lian postan sorton en la mondo, sed oni diris ke vidis lin en Vladivostoko.

### **Nian respekton al la germana sennoma esperantisto!**

- La plej bonaj amikoj de Ŝadrin estis studentino Zoja Skvorcova kaj oficisto Matvienko. Ili pasigis tempon nur kune, parolis nur Esperante. Ili havis multajn planojn kaj esperojn. Sed en 1933 Hitler venis al potenco en Germanio kaj Esperanto iĝis danĝera okupo en multaj landoj de la mondo. La Soveta Unio ne estis la eksepto.
- Jaro 1935. Samara estis renomita al Kujbiŝev.
- Jaroj 1946 – 1950. Helmut Breuninger el Germanio kun sia edzino kaj filo Karlo (estonta esperantisto) loĝis en Kujbiŝevo kiel teknika specialisto, translokita al Soveta Unio por repara militdamaĝojn. En malproksima estonteco en 1997 familio de Karlo Breuninger akceptos 5 samarajn esperantistojn dum Eŭropa Esperanta Kongreso en Stutgarto.
- Jaro 1960. Anonco pri ebleco de abono de la revuo «Bulgara Esperantisto» aperis sur pordoj de la hotelo «Ĵiguli» en Samara. La abonado estis organizita de gazetkioskisto Ivan Mihajloviĉ Pisarev – esperantisto, kiu transloĝiĝis al Samara el Leningrado. Danke al tiu abono samaraj esperantistoj ekkontaktis kun samideanoj en kaj ekster la lando. Fama kujbiŝeva esperantistino Skvorcova rememoris, ke jam en 1960 jaro ŝi uzadis Esperanton dum turistaj vojaĝoj al Ĉeĥoslovakio kaj GDR. Si estis forte impresita de renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj. En 1961 Skvorcova iĝis pensiulo kaj la tutan sian energion direktis al propagando de Esperanto. En 1962 ŝi lanĉis kursojn en Regiona Domo de Instruistoj. Samtempe, ekde 1960, alia Esperantista rondeto funkciis en palaco de kulturo «Aŭroro» (Заря). La gvidanto estis P. Astafjev, kiu ankaŭ iĝis pensiulo.) Skvorcova rememoris, ke ŝi gvidis kursojn en Medicina Instituto (1964), en Pedagogia Instituto (1966-1968), en palaco de kulturo «4-a GPZ» (1969), en palaco de kulturo «Stelo» (Звезда) (ekde 1971).



**Eternan memoron kaj nian respekton al Zoja Dmitrievna Skvorcova!**

- Jaro 1972. Skvorcova kaj Astafjev verkis artikolojn pri Esperanto en diversaj gazetoj de Kujbiŝeva.



- Samjare GMK (Urba Junulara Klubo ĉe regiona komitato de Komsomolo) publikis anoncon pri Esperanta kurso en gazeto «Voljskij Komsomolec». Sur bazo de tiu kurso en 1973 estis organizita «Kujbiŝeva esperantista klubo». La ĉefo de la klubo iĝis Skvorcova. La klubo propagandis Esperanton pere de organizado de kursoj, lecionoj, ekspozicioj, daŭrigis kolektivan korespondadon kun eksteraj landoj. La klubanoj partoprenis en kunvenoj de Sovetuniaj esperantistoj kaj en internaciaj renkontiĝoj.
- Jaro 1975. La klubo iniciatis partoprenon de infanoj el Palaco de Pioniroj, Arta Lernejo № 1, ktp en internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj, organizita de esperantistoj el Hispanio, Francio, Italio, Jugoslavio kaj Pollando.
- Jaro 1976. La klubo akceptis gastojn de Stara Zagora: aktorojn de drama teatro «Geo Milev» kiuj prezentis spektaklon «Zykovy» en Kujbiŝeva Drama Teatro.
- Jaro 1977. La presidanton de «Kujbiŝeva esperantista klubo» iĝis Igor Fejgin. Laŭ lia propono la klubo estis renomita je «Velo» – la titolo malĉifreblas “Vivu Esperanto la Lingvo de Optimistoj”. Dum multaj postaj jaroj Igor Fejgin estis aktiva membro de Esperanta movado en la urbo. Nun Igor Fejgin loĝas en Peterburgo.



**Bondezirojn kaj nian respekton al Igor Vladimiroviĉ Fejgin!**

- Jaro 1980. Laŭ materialo de la albumo «Hiroŝima kaj Nagasaki», ricevita el Japanio, amikoj de la klubo «Velo» el Novokujbiŝevska klubo de amatora kanto – esperantistoj-geedzoj Larisa kaj Vladimir Denisov – kreis lumbildan sonigitan filmon «Estos karesa pluvo» («There Will Come Soft Rains», Будет ласковый дождь). Tiu filmo estis montrita dum multaj eventoj en la klubo «Velo» kaj enkadre de aktiveco de propaganda teamo, surŝipe naviganta laŭ la rivero Volga en Kujbiŝeva regiono al pli ol 10 000 personoj.



**Eternan memoron kaj nian respekton al geedzoj Larisa kaj Vladimir Denisov!**

- Samtempe la klubo «Velo» iĝis la kolektiva membro de la societo de Sovetia – Bulgara amikeco. La klubo «Velo» lanĉis E-kursojn en Togliatti ĉe internacia klubo «Granado». La kursoj rezultis aperon en Togliatti de E-klubo sub gvido de Evgenij Kononenko.
- Jaro 1981. La 18-an de Januaro naskiĝis nova esparantista klubo «Kontakto» gvidita de Marija Alekseevna Prilepskaja. «Kontakto» organizis kursojn en palacoj de kulturo «Samtempulo» (Современник) kaj «Fervojistoj» (Железнодорожник). «Kontakto» amikiĝis kun esperantista filma studio «Rondo» sub gvido de Vladimir Anatoljeviĉ Dovgij. La klubo «Kontakto» ankaŭ organizis korespondajn kursojn. Lecionoj por la kursoj estis preparitaj de M. Prilepskaja. Post la fino de la kursoj okazis ekzamenoj kaj eldonitaj konfirmiloj. La studentoj venis el Penza, Saratov kaj Astraĥano. Ankaŭ E. Kaplun aktive laboris kun aliaurbaj studentoj. Ankoraŭ sepfoje iamaj studentoj vizitis Kujbiŝevon por renkontiĝoj. Nun Marija Alekseevna loĝas kaj aktive agadas en Samara.



(05.08.1995)

**Bondezirojn kaj nian respekton al Marija Alekseevna Prilepskaja!**



- Samtempe Esperantaj kursoj estis organizitaj en Kujbiŝeva ŝtata universitato kiel parto de Fakultato pri Publikaj Profesioj. Tio signifis, ke Esperanto estis kvankam loke kaj flanke, sed inkluzita en la ŝtata sistemo de alta edukado. La inicianto de la kursoj estis Igor Feigin, ege helpis Galina Vasiljevna Kuĉumova (ŝi memstare retajpis la tutan lernolibron de Boris Kolker por disdonado al studentoj). La instruisto de la kursoj estis Valentina Danilovna Ŝarabkova (Lisienkova), kiu laboris en la universitato kiel scientist pri fiziko.

Post fino de la kursoj okazis ekzamenoj kaj estis enmanigataj certigiloj – «Organizanto de Esperantistaj Rondetoj». Mi mem (Sergej Palmov) estis studento de tiuj kursoj (1982-1984). Mian certigilon, kiel ekzemplon, vi povas vidi sube.



Valentina Danilovna Ŝarabkova multon kontribuis al evoluo de Esperanto-movado en Kujbiŝevo. Ŝi fruktodone komunikadis kun Regiona komiitato de Komsomolo kaj estis unu el la plej ĉefaj organizantoj de multaj e-renkontiĝoj kaj okazajoj en la urbo (inkluzive OkSEJT-25 en 1983, VER-1 en 1984, OkSEJT-27 en 1986).



**Eternan memoron kaj nian respekton al Valentina Danilovna Ŝarabkova (Lisienkova)!**

- Jaro 1983, Agosto. La klubo «Velo» organizis OkSEJTon-25. Ĝi okazis en turisma bazejo «Kverketoj» (Dubki) apud Kujbiŝevo.



- Jaro 1984, Novembro. Klubo «Velo» organizis VERon-1. Ĝi okazis en la sama en turisma bazejo «Kverketoj».



- Jaro 1986, 16 – 25 de Agosto. La klubo «Velo» organizis OkSEJTon-27. Ĝi okazis samloke.



La tendaro estis dediĉita al 400-jariĝo de Kujbiŝevo (Samara).



Solena malfermo

Pli ol unu cent gastoj vizitis la tendaron. Kiel honoraj gastoj partoprenis membroj de ensemblo «Inspiro» sub gvido de V. Soroka. La ensemblo ĵus forlasis Ukrainion post eventoj en Cernobil. La ensemblo prezentis kelkajn koncertojn al tendaranoj en la turisma bazejo «Kverketoj» kaj unu grandan koncerton en la urbo en la palaco de kulturo «Stelo» (Zvezda). La koncerto estis malfermita por urbanoj-ne esperantistoj. Oni povis aĉeti biletojn kaj aŭskulti. Vere dirante, mi memoras ke biletojn acetis nur du neesperantistoj, sed poste mono estis redonita, ĉar tiuj urbanoj estis miaj gepatroj ☺.

Dum la tendaro estis ankoraŭ unu grava okazaĵo: loka televido faris por urbanoj elsendon pri Esperanto kun partopreno de tendaraj gastoj kaj ensemblo «Inspiro». Tia estis la epoko!

Ankaŭ la kinostudio «Rondo» faris filmojn pri esperantistaj renkontiĝoj.



Komuna foto




Malgranda komuna foto 1



Malgranda komuna foto 2

- Jaro 1987. En la programo de urboj-ĝemeloj Kujbiŝevaj esperantistoj kreis teamon por somera agrikultura laboro en Bulgariaj ĝardenoj. 15 esperantistoj el Kujbiŝevo veturis eksterlanden laŭ invito de Bulgaraj esperantistoj.
- Jaro 1991. Kujbiŝevo estis renomita denove Samara.
- Jaro 1994. Samaraj esperantistaj kluboj «Velo» kaj «Kontakto» unuiĝis.
- Jaro 1997. Per invito de germanaj gesamideanoj 20 Samaraj esperantistoj vizitis ĝemelan urbon Ŝtutgarto por partopreni Eŭropan Esperantan Kongreson. Niaj esperantistoj loĝis en germanaj familioj. 5 personoj estis akceptitaj de la familio de Karlo Breuninger (la knabo kiu loĝis en Kujbiŝevo–Samara en malproksimaj postmilitaj jaroj 1946 – 1950).



**Bondezirojn kaj nian respekton al Karlo Breuninger kaj lia familio!**

Estis multe da interesaj okazaĵoj post la jaro 1997. Sed ili estos la temoj de sekvaj historiaj rememoroj.

Nun, dum VER-16, ni kune skribas novan nuntempan historion de Esperanto en Samara. Ni faru ĝin interesa kaj neforgesebla! Vivu Esperanto! «Por la tuta vivo ĉiam taŭgos ĝi!»

Sube estas originalaj arkivaj fotoĵoj:



Z.D. Skvorcova kaj P.J. Astafjev



Klubo «Velo» kaj geedzoj Denisov



Klubo «Kontakto»



Eksaj kluboj «Kontakto» kaj «Velo» post unuiĝo. 2005 jaro



Z.D. Skvorcova kaj V. Denisov



V. Denisov kaj V. Dovgij



Helmut Breuninger kaj Igor Fejgin



Malgranda komuna fotado 3 dum OkSEJT-27

*La raporto estas bazita sur rememoroj de Pjotr Jefimoviĉ Astafjev, Valerij Sergejeviĉ Šadrin, Zoja Dmitrijevna Skvorcova, Marija Aleksejevna Prilepskaja, Igor Vladimiroviĉ Fejgin kaj aliaj samaraj esperantistoj. Kompilis Elena Poljanskaja kaj Sergej Palmov. Prezentiĝita la 2an de novembro 2019 dum VER-16 en Samara.*



## Originalaj kantoj



### Gennadij Ŝilo

*Gennadij Ŝilo estas ne nur renoma advokato, profesoro pri juro, fondinto kaj rektoro de Eŭropa jura universitato "Justo" (1995-2012), brila instruisto de Esperanto kaj organizanto de la movado, sed ankaŭ tradukinto de pluraj ukrainaj kaj rusaj kantoj kaj romanoj. Ĉi tie ni prezentas kelkajn liajn originalajn kanto-tekstojn, kiuj estis kaj estas plenumataj de diversaj amatoraj kaj profesiaj artistoj.*

#### Amika rondo

*Muziko de Andrijasĉenko*

Kio estas Esperanto?

– Lingvo kuniganta.

Kie oni ĝin posedas?

– Kie pacon kredas.

Kion ĝi ebligas tamen?

– Amikecon, amon.

Kie estas nia rondo?

– En la tuta mondo.

*Refreno:* Esperanto, Esperanto – nia revo, amo.

Esperanto, Esperanto – nia forto, flamo.

Esperanto, Esperanto – nia sorta reto.

Esperanto, Esperanto – nia sancta kredo.

Kie estas nia tujo?

– En Esperantujo.

Kie estas niaj faroj?

– Certe, en tendaroj.

Kio ne agnoskas limojn?

– Amikec, intimo.

Kio estas la plej kara?

– Samideanaro.

*Refreno.*

Cele pura kompanio

Estas opo nia.

Logas ĝia kre-etoso

kiel rozo sprosa.

Kaj aspiras la renkontojn

– Belo-ĝuajn fontojn,

Ĉar beliga estas mondo

De amika ronodo

*Refreno.*

## **Dia rozo**

*Muziko de G. Timofeev*

Dian rozon  
Blufolian,  
Vivo-sproson,  
Ardon pian  
    Sendis Di' al mi.  
Vi, la floro, –  
Kre' mistera,  
Mem pudoro,  
Belo vera –  
    Dolĉa melodi'  
    Dolĉa melodi'

*Refreno:* La streĉitaj folioj,  
malfermiĝas burĝono  
Por la amo, por vivo,  
Por la dia kanzono.

Mia revo,  
Mia amo,  
Blanka mevo,  
Kora flamo –  
    Ĉu mi havas vin'?'  
Se vi – l' amo  
Kaj la fido  
De l' alarmo  
Kaj de l' frido –  
    Dio savas nin.  
    Dio savas nin.

*Refreno.*

Vi – l' azilo  
Por mi sola,  
La trankvilo  
Kaj konsolo –  
    Kun folia blu'.  
Dolĉebrio –  
Via ĉarmo,  
Ĝuo, spiro,  
Lumo varma –  
    Vi, nenio plu.  
Vi, nenio plu.

*Refreno.*

## La venko

*Muziko de O. Ŝilo*

Al vi ni strebis tra ofend', tra mort' kaj hurlaj fajroj,  
Kaj kugloj kiel morta vent' fajfadis dum kvar jaroj.  
Sed strebis ni al vi tra ĝem' de tero en la vundoj,  
Kaj jen eksplodis tiu prem' per flam' ĉielprofunda.

La venko! – tondris tiu flam'  
Sur tero kaj sur maro.  
La venko! Plu ne portas jam  
Eksplozoj trist-amaron.  
La venko! – floras la salut'  
Ĝis horizonto klara.  
Ni strebis al la paca mut',  
Ni strebis al la paca mut',  
Kaj jen – la venko kara.

Pro ajna prezo, nia ter' vin savi – jen devizo.  
Se temos pri nukle-ofer' – pereos civilizo.  
Ho, nia hejmo – nia ter' en frosta astra mondo,  
Vin helpos savi de l' infer' amika nia rondo.

La venko – estas pacifer'  
En ĉiu monad sfero,  
Ĉar venko en nukle-infer' –  
Ĝi estas krimĥimero.  
Ni venkos nur se rompos ni  
Mortig-raketan klingon  
Kaj se rapide trovos ni,  
Kaj se rapide trovos ni  
Komunhomaran lingvon.

## Magia sento – amo

*Muziko de T. Amelina*

Mi volas pri nenio pensi –  
Nek pri eterno, nek pri morgaŭ,  
Nur senti vin sen ion bremsi,  
Sen ion peni aŭ prizorgi.  
En sentoj ardaĵ mi ĝufolas,  
Trinkante vin, estaĵo dia.  
Ĉu mi aldone ion volas,  
Krom ĉarmo via, vivo mia?

*Refreno:* Magia sento – amo,  
Ĝi estas kora flamo,  
Ĝi estas freŝa vento,  
Ĝi estas ĝu-torento.  
Kaj se pereas amo,

Naskiĝas ies dramo,  
Ĉar ĉesas pia sento –  
La viva argumento.

Se al la mondo ama venos  
Por ambaŭ ni detrua forto,  
Se la konscio nia svenos,  
Ni lasu pura sentan fonton.  
Se nin ekregus ŝtormo pesta,  
Mi volus nun kaj en futuro  
Ke inter ni sincero restu,  
Estimo kaj intimo pura.

*Refreno.*

Neniam lasu min pasio,  
La sento al prudent' rezistu:  
Pasia sento estas vivo,  
Ĉar dum ni sentas, ni ekzistas.  
Min tuŝas milda florodoro,  
Karesas viaj korobatoj.  
Do, pulsas la anima oro!  
Do, vivas amo – mia fato!

*Refreno.*



---

*CERBE kaj KORE*  
*n-ro 11 (79), novembro 2019*  
*Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 108*  
*[eksa Bulteno de REU (BdR)]*

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio"  
*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de*  
*ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru) .  
*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

---

Redaktofino 04.11.2019